

Fajrero 3/1960

UNU J UBILEO

En zorgoj de ĉiutaga vivo preskaŭ malaperas unu tre grava datreveno -10-jara daŭro de celhava movado de esperantista junularo en Ĉeĥoslovakio. La okazintaĵoj antaŭ 10 jaroj havis sian signifan taskon ne nur inter la Esperanto-junularo, sed por la movado ĝenerale. Ĉu ni rajtas konsideri nian rolon tiel grava?



Ni iom revenu en la pasintajn jarojn. Kvankam en nia lando ekzistis unuopaj junularaj grupoj jam antaŭ j. 1950, tamen ties laboro estis sen iu ajn komuna gvido kaj programo. Juneca forto kaj entuziasmo rompis ŝelon de sia izoleco nur antaŭ kaj dum la VIII-a Esperanto-Kongreso ĉeĥoslovaka en Brno en la j. 1950-a. De tiamaj deklaroj ne estis malproksime al agoj. Jam en Brno estis kunvokita la unua junular-kunveno, estis elektita komitato de junulara sekcio de EAĈSR. Sed la plej fortan impulson donis en la sama jaro la Esperanto-kolegio en Rožnov p/Rad. Multaj dekoj da gejunuloj renkontiĝis por komune lerni la lingvon kaj por lerni organizi sin. Rožnov fakte malkovris novajn gvidantojn kaj junajn instruistojn,

kiuj poste longan tempon staris frunte de la movado. Kompreneble, ke post tiu tempo la junular-movado tre disvastiĝis, novaj rondetoj kreskis kiel fungoj, ekaperis multaj bultenoj, cirkuleroj. La nombro de junularaj grupoj altiĝis je 36. Sekve de tio ankaŭ la pluaj du SEK en Rožnov fariĝis junul-renkontejoj.

Ekde la kunveno en Brno okazadis jarkunvenoj ĉiujare. En 1952 komenciĝis nova tipo de Esperanto-lernejoj - Someraj Esperanto-Tendaroj. Iniciato de la junular-grupo en Opava elvokis fortan resonon kaj SET fariĝis regula entrepreno de ĉiu somero. Per tiu ĉi aranĉo ĉiam kulminis tutjara laboro de la grupoj. 15 SET-oj en 8 jaroj edukis pli ol 800 gejunulojn. Tiel fariĝis grava faktoro por evoluo de la Esperano-movado en Ĉeĥoslovakio.

Sed plej signifa estis la tempo post la jaro 1950. Tiam la junularo transprenis preskaŭ tutan laboron kaj respondecon. Pro erara suspekto el kosmopolitiso la grupoj ekster la junulara movado izoliĝis kaj preskaŭ malaperis. Male la junularo. Ĝi starigis sian "centron", kiu konsistis el la plej bonaj gejunuloj kaj agis. Eldonadis bultenon, organizis la menciitajn tendarojn, kunvenojn, starigis ekzamenan komisionon, ellaboris sistemon de A-B-C-D kursoj kaj samrangaj ekzamenoj, edukis junajn instruistojn de Esperanto, organizis intergrupajn konkursojn, proklamadis "la plej bonajn grupojn de la jaro" (1951 Ostrava, 1952 Lanškroun, 1953 Brno, 1954 Opava), k. a. Nur dank' al firma gvidado, al juna entuziasmo kaj komuna profunda intereso, nia esperantistaro ne perdis optimismon kaj iniciatemon.

Tio estis nur kelkvorta demonstro de nia junular-movado. Ni rigardu el kiu ajn vidpunkto, ni devas tamen konstati, ke ĝia laboro estis fruktodona, ĝiaj rezultoj estas malgraŭ ĉio agnoskendaj! Multaj tiamaj junularaj funkciuloj nun vigle laboras en

Esperanto-rondetoj. El lingva vidpunkto ankaŭ aperis pluraj talentoj.

Sed ankaŭ nun junularo signifas multon por la movado. Rigardu - jen SET-oj, labor-kunvenoj, ankaŭ tiu ĉi modesta bulteno estas verko plejparte de junuloj. Tamen ne estas jam inter junularo tia unueco, kunlaboro, interhelpo, kiel antaŭ jaroj. Junularmovado hodiaŭ ne ekzistas kiel movado, ĝi estas denove disigita, preskaŭ kiel antaŭ la jaro 1950-a. Ĉu tiu stato estas evitebla? Kiel vi imagas la perspektivojn de junularmovado? Ni esgeras, ke vi respondos al ni la demandojn. Kaj ankoraŭ unu: Ĉu nur junularo kulpas pri nuna stato ne tro sana? V. K. - J. W.

EL LA HISTORIO DE ESPERANTO-MOVADO EN SILEZIO

Unuaj signoj de Esperanto-movado en iama Silezia regiono (Těšín-Silezio) datiĝas en la jaro 1921, kiam en Praha okazis la 13-a Universala kongreso de Esperanto, kiu en Ĉeĥoslovakio vekis vastan interesiĝon pri Esperanto inter la loĝantaro de nia lando. En Silezio meritas specialan mencion tri lokoj: Třinec, Stonava kaj Karviná. En vintraj monatoj de la sama jaro estis tie organizitaj kursoj, kiujn partoprenis po kelkdekoj da personoj. Ĉiujn tri kursojn gvidis plensukcese bona pedagogo, Prof. Leopoldo Kronenberg, kaj partoprenantoj de tiuj kursoj fariĝis la unuaj pioniroj de la Esperanto-movado en tiu regiono.

En Stonava post kursfino kelkaj fervoruloj sukcesis fondi grupon kaj nomigis ĝin "Estonteco". Unua prezidanto de novfondita grupo fariĝis s-ano Tichawski, unu el la plej diligentaj kurs-frekventantoj. Bedaŭrinde post plebiscito kaj dispartigo de Silezio, parto de la fregventintoj transiris en Polujon, inter ili ankaŭ Prof. Kronenberg kaj s-ano Tichawski. Esperantistoj en Stonava decidiĝis portempe likvidi sian grupon pro malaltiĝo de oferema anaro. Tamen kelkaj unuopuloj ne ĉesis prepari kondiĉojn por refondigi la grupon. En la jaro 1923 ili sukcesis organizi kurson en gimnastika societo SILA en Albrechtice. La kurso finiĝis sukcese kaj la movado tiam tre malforta, gajnis kelkajn fervorulojn.

En Stonava komencis venadi semajn gazeto "Esperanto Triumfonta", poste "Heroldo de Esperanto". Kelkaj s-anoj fariĝis membroj de UEA. En la jaro 1925 s-ano Paulo Bubik fariĝis delegito de UEA. En septembro 1926 estis refondita la grupo en Stonava kiel sekcio de gimnastika societo SILA. Kiel prezidanto estis elektita s-ano P. Bubik. Danke al stonavaj Esperantistoj en sekvantaj jaroj estis organizitaj kursoj en najbaraj vilaĝoj Horní Suchá kaj Životice, kie elkreskis kelkaj dissemnitaj greneroj.

Post foriro de Prof. Kronenberg en Pollandon, restis en Třinec kaj en Karviná kelkaj fervoruloj. Estis aranĝitaj kelke da kursoj kaj la movado iom post iom fortiĝis. En Třinec gvidis kursojn instruisto Liberda.

En la jaro 1930 renkontiĝis kelkaj esperantistoj sur monto Kozubová. Tie ili decidiĝis ekklopodi pri fondo de regiona esperantista organizaĵo. Estis skribita petskribo al distrikta oficejo kaj en la jaro 1931 oni ricevis permeson fondi "Regionan Esperantistan Ligon" kun sidejo en Český Těšín. En la estraron estis elektitaj plej fervoraj esperantistoj el Silezio, inter ili s-anoj: Krysta, Bubik, Poncza, Skulina, Hladký, Sebera. De tiu jaro oni datas plivigliĝon de la movado en Silezio. En ceteraj urboj kaj vilaĝoj estis poste fonditaj grupoj de REL kaj organizitaj kursoj.

En la jaro 1934 fondiĝis grupo de REL en Třinec, prezidantecon akceptis s-ano

Liberda. Ĝis tiu tempo vivis tie dise nur kelkaj izoluloj, iamaj kursanoj, nun la movado en Třinec plivigliĝis. La grupo havis sian kunvenejon en Laborista Domo, sur ties muro apude enirejo estis lokitaj kluba insigno kaj informkesto. Ĉiujare oni aranĝis kursojn. Sed la plej grandan sukceson Třinecanoj atingis en la jaro 1936, kiam en Silezion venis estonaj Esperanto-instruistoj - geedzoj Seppik, kiuj gvidis Ĉe-metodajn kursojn en pluraj lokoj de Silezio. En Třinec tiam aliĝis cent okdek personoj.

Ili devis esti dividitaj je tri paralelaj kursoj.

REL organizis ĉiumonate regionajn kunveneojn, dum somero en montaro, dum vintraj monatoj en diversaj urboj de Silezio. Viglan Esperanto-movadon en Silezio ĉesigis germana okupo en la jaro 1939.

Post liberigo oni restarigis la movadon en kelkaj lokoj. La grupoj fariĝis filioj de EAĈSR. Ankaŭ la grupo en Třinec, kiu nun estas sekcio de ZK ROH ĉe Třinecké železářny. En ĝi grupiĝas nur negranda parto de esperantistoj en Třinec kaj ĉirkaŭaĵo. Sed malgraŭ tio ili penas pri bonaj rezultoj en la agado kaj pri utilaj servoj al la socialisma patrujo. Ekde fondiĝo de Esperanto-grupo en Třinec pasis en jaro 1959 jam 25 jaroj. Esperantistoj en Třinec esperas atingi en estonteco ankoraŭ pli grandajn sukcesojn, ol ili atingis ĝis nun.

-po-

DE ŜPINFIBRO AL TEKSUMAĴO

Teksumaĵoj ĉirkaŭas nin en ĉiu minuto de nia vivo, ne nur en formo de tolaĵo kaj vestoj, sed ili estas en niaj loĝejoj, en pneŭmatikoj de niaj veturiloj, en rimenoj de niaj maŝinoj kaj alie kaj alie.

Verdire teksumaĵoj estas plej diversmaniere interplektitaj kaj plej diversmaterialaj ŝpinaĵoj simplaj aŭ torbobligitaj je fadenoj. Ni nomu nur la ĉefajn ŝpinmaterialojn. Ili estas longmolekulaj fibroj vegetalaj (kotono, lino, kanabo, juto, sisalo k.s.), animalaj (lano, silko k.s.), mineralaj (asbesto, fero, latuno k.s.) servas kiel teksmaterialoj. Dum kelkaj lastaj jardekoj oni klopodas sukcese anstataŭigi la naturajn ŝpinfibrojn per malpli~inultekostaj. Tie1 ekestis artsilko el celulozo, artlando el kazeino, kaj en lasta tempo aperis diversaj polimeraĵoj, kiuj plurokaze eliminis la ceterajn materialojn, ĉar oni povas al la polimeraĵoj doni deziratajn ecojn, precipe ŝirrezistemon, kian havas ekzemple la usona najlono kaj krepnajlono, ĉeĥoslovaka silono kaj krepnilono.

Laŭ la plektomanieroj oni dividas teksumaĵojn je: 1) teksaĵoj, 2) trikaĵoj, 3) posamentaĵoj, 4) tulaĵoj, 5) kroĉetaĵoj, 6) ŝnuroj.

1) La teksaĵojn karakterizas du fadensistemoj, nome la laŭlonga verpo kaj la laŭlarĝa vefto.

2) En la trikaĵoj ekzistas ĉiam nur unu el tiuj sistemoj kaj ĉi teksumaĵojn karakterizas maŝoj, per kiuj la varperoj aŭ vefteroj kuniĝas.

3) Baza direkto de la fadenoj en posamentaĵoj estas oblikva, dumvoje tamen povas la renkontiĝantaj fadenoj plej diversmaniere ĉirkaŭi sin reciproke kaj krei tiel bonkvalitajn ~~punktojn~~ punktojn. Dum la fabrikado estas la unuopaj fadenoj volvitaj sur unuopaj bobenoj, kiuj iras la komplikajn vojojn. Tial la posamentaĵo ne povas esti larĝaj, ĉar nombro de bobenoj estas limigita.

4) Tulo havas maldensajn vasperojn kaj same maldensajn bobenfadenojn, kiuj ĉirkaŭante la varperojn, formas sesangulajn truetojn, kvazaŭ abelĉelaron. Ornamentojn en tulaĵoj formas varperoj flankenŝovitaj kaj revenintaj.

5) Kroĉetaĵoj estas kvazaŭ kombinaĵo de teksaĵo kaj trikaĵo: ĉenoj de maŝoj el varperoj firmitenas vartarojn horizontalajn aŭ oblikvajn. Per tiu maniero oni fabrikas ornamentriĉajn fenestrokurtenojn tiel, ke inter la unuopaj varperoj (maŝĉenoj) la maŝino metas diversdense unuopajn vefterojn. Pro tiu celo estas unuopaj vefteroj volvitaj sur unuopaj bobenoj, kiuj tamne ŝanĝis sian lokon.

6) Por bazaj ŝnuroj la maŝino tordas du aŭ pli multajn fadengrupojn per rapide rotaciantaj hokoj sur forveturanta maŝinparto. (Samtempe ili estas trempate en varma miksaĵo el sebo kaj vakso aŭ parafino, se temas pri ŝnuroj, kiuj ne putru.) La veturparto fine haltas malstreĉinte la torditajn fadengrupojn kaj ili kunkordiĝas redirekte.

En maŝinoj alispecaj rotacianta bobeno samtempe tordas kaj volve surprenas la ŝnuron. Tiamaniere oni kutimas fari precipe la delikatajn ornamaĵojn.

Pli komplikajn ŝnurojn oni fabrikas same kiel posamentojn, nome helpe de kurantaj bobenoj.

| | |
|---|---|
| ŝpini - přísti | teksumaĵo - textilní výrobek |
| fĭbro - vlákno | ŝpinaĵo - příze |
| tordoblīgi – tkát skát | kotono - bavlna |
| lino - len | kanabo - konopí |
| juto - juta | sisalo – sisal (vlákna na provazy z listů aloe) |
| lano - vlna | |
| silko - hedvábí | silikonoj – silikony (sloučeniny křemíku, uhlíku, vodíku a kyslíku) |
| polimeraĵo - polymer, velkomolekulární sloučeniny | |
| plekti - proplétat | trikaĵo - pletenina |
| tulo – tyl | varpo - osnova |
| vefto – útek | elimini - vyloučiti |
| varpero – osnovní nit | najlono - nylon |
| veftero - útková nit | teksaĵo – tkanina |
| tulaĵo - tylovina, angl. / | sebo - lůj |
| posamento – prýmek (krajka) | vakso - vosk |
| kroĉetaĵo - krajkovina | punto - krajka |
| "Crochet" | bobeno - cívka |

J a r o s l a v S E I F E R T: LA PIPO DE LA PAĈJO
(El „Panjo“)

Paĉjo fumadis pipon
kiam finiĝis tag'.
Mi vidas la ekipon:
saketon kun tabak'.

Silente disiĝadis
nubet' el griza blu'.
Kion ni ame ŝatis,
tion ni amos plu.

Li, kiam mallumiĝis,
sidadis sur verand' ,
kaj alumet' sufiĉis
eklumi al la vang'.

Kio ja estus, kio,
la viv' sen rememor'?
Plej bela idilio
el pipo ŝvebis for.

Sed panjo koleremas,
nur milde, sen impet',
ĉar paĉjo, nu, dissemas
tabakon el saket'.

Se pipo strikon faras,
li petas pri absolv'.
Al kiu ne elfalas
iom da cindra polv'.

Silente disiĝadis
nubet' el griza blu'.
Kion ni ame ŝatis,
tion ni amos plu.

Li en malsanoj lasas
pipon sur parapet'.
Kaj panjo larmojn kaŝas
plorante en sekret'.

Ŝi ĝin tenere tuŝas
sen naŭzo pri odor'.

Nun misodoro fuĝas.
Nun spiras el ĝi flor'.

Karese ŝi ĝin prenas
hontruĝa antaŭ ni.
Kaj sur la pip' ektemas
da perloj pli kaj pli.

Silente disiĝadis
nubet' el griza blu'.
Kion ni ame ŝatis,
tion ni amos plu.

Trad. Jiří Kořínek

FRYDERYK CHOPIN - GRANDA FILO DE LA POLA POPOLO

Konkursa tasko de Gabriela Rothová el Poprad

La 22-an de februaro 1960 rememoris la tuta muzikama mondo 150-an datrevenon de la fama pola komponisto Fryderyk Chopin. Jen kelkaj detaloj pri vivo de la granda majstro.

Zelazowa Wola, - malvarma februara tago de la jaro 1810. Al Nikolao Chopin kaj Justyna Krzyżanowska naskiĝis filo. Tiam neniu antaŭdiris, ke naskiĝis homo, kiu per sia tuta animo apartenos al la pola popolo, al la muziko.

Jam de l' junaĝo grandan influon je lia sentema koro havis harmonia vivo de la familio. Precipe la delikatsentema inteligenta patrino ludis en lia vivo grandan rolon. Ŝi sidis unua kun la malgranda knabo ĉe fortepiano, ludis kaj kantis al li popolajn kantojn, kaj tiamaniere konatigis sian filon kun trezoroj de la popopola muziko. Jam tiam montris la knabo grandan intereson kaj muzikan talenton.

En Varsovio, kien transloĝiĝis la familio kelkajn monatojn post naskiĝo de Fryderyk. Li ricevis la unuan kaj eĉ la lastan instruiston de muziko – ĉeĥon Vojtěch Živný, kiu konatigis lin kun mondfamaj komponaĵoj de Bach kaj Mozart. Fryderyk ekamis ilian belegan muzikon. Ofte li vojaĝis dank' al siaj amikoj ekster Varsovio, kie li kolektis multajn popolajn kantojn.

Ke li estis vere mirakla infano, pruvas la fakto, ke 7-jara li skribis jam la unuan komponaĵon - Polonezon G-minoran. Kiel 12-jara li skribis plurajn; - Polonezojn As-maĵoran kaj Gis-minoran. Tiam li private vizitadis lecionojn de Józef Elsner, fondinto kaj unua rektoro de la varsovia konservatorio. Dank' al li, konatiĝis Fryderyk kun la verko de Adam Mickiewicz. En la jaro 1829 sekvis finekzercoj en la konservatorio. Tia estis jam pretaj kelkaj belegaj komponaĵoj – Polonezo, D-minora, Nocturno E-minora, Krakowiak kaj aliaj.

Dum mallonga tempo estis en Berlino kaj Vieno, kie li intencis konatiĝi kun la tiama muzika vivo en Eŭropo. Li estis ankaŭ en Prago, kiu postlasis profundajn impresojn en li. Post reveno hejmen li denove verkis multajn polonezojn, nocturnojn kaj kantojn. Sed li sentis ke Varsovio tamen estas malgranda por kontentigi lian grandan talenton. La 11-an de oktobro li aranĝis adiaŭan koncerton. Tre

malfacilanime li foriris el sia patrolando. Tamen, la franca revolucio, disvastiĝinta en la tuta Eŭropo, devigis lin forveturi. Nenie li estis kontenta, - post ekscio, ke la revolucio estis likvidita, li forlasis Vienon. En Stuttgart li skribis siajn du grandajn revoluciajn etudojn - Etudo C-minora kaj Preludo D-minora.

En Parizo renkontiĝis en tiu revolucia tempo multaj famaj homoj: Balzac, Stendhal, Hugo, George Sand, Heine, Liszt, Bellini, Paganini kaj aliaj, kun kiuj li ofte kunvenadis. Fryderyk tre ofte rememoris sian patrujon, korespondis kun sia fratino Ludovika, kiu fariĝis lia plej proksima amikino. Li moviĝis en la plej altaj rondoj de tiama pariza socio. En tiu tempo li vojaĝis tra la tuta Eŭropo, koncertis, ĉie admirita, ovaciita. En la jaro 1835 en Bohemio li eksentis profundan amon al Maria Wodziaska, kiu ja daŭris nur mallonge. Sian feliĉon, siajn sentojn li esprimis en la valso As-majora, komponita en la kastelo Děčín. Sed trompita li forvojaĝis Parizon, kie ravis lin franca verkistino George Sand. Kune ili travivis kelkajn monatojn sur Balearoj, kie Chopin - ĉirkaŭita de belega apudmara naturo - multe komponis. Menciendaj estas 24 preludoj, Balado F-majora, Polonezoj As-majora kaj C-minora. Tamen, post nelonga tempo ili disiĝis, la amo fariĝis por la sentema komponisto preskaŭ fatala. Ĝi lasis profundajn postsignojn en li, same kiel morto de la amata patro, de amiko Jan Matušovský kaj instruisto V. Živný. Ĉiuj ĉi eventoj plirapidigis lian malsanon - tuberkulozon. Ĉiam pli malfortan fraton vizitis la fratino Ludovika, kiu rekuraĝiĝis lin nur por mallonga tempo. Li sentis, ke neniu el la socio, en kiu li devis moviĝi, komprenis lin, lian amon al la pola popolo, nostalgion.

En tiu ĉi malgaja tempo (1839-47) li jam malmulte koncertis, sed ĝuste tiam li komponis siajn la plej belajn verkojn, - inter ili Polonezojn A-majoran, Fis-minoran, As-majoran, valsojn mazurkojn, lulkanton, Tarantelon kaj multajn aliajn. Ili estis veraj trezoroj de l' monda muziko, superaj verkoj de majstreco de Chopin.

Kun sia lasta mazurko F-minora li adiaŭis kun la mondo (printempo 1848). Denove alveturis lia plej proksima amikino, Ludovika, sed la 17-an de oktobro 1849 li elspiris la lastan fojon. Lia koro estas konservita en la Varsovia preĝejo de Sankta Kruco.

La tuta muzikema mondo, ĉiuj geamikoj funebris. Mortis ja granda geniulo, kiu donis al la mondo grandan parton de sia vivo. Funebris la pola popolo, - mortis ja unu el ĝiaj plej bonaj filoj.

Geniecon de Chopin plej bone karakterizas vortoj de pola poeto kaj skulptisto Norwid: "Li kapablis kun misteroplena facileco solvi la plej grandajn taskojn de l' arto - li nome kapablis kolekti kampajn florojn, ne deskuinte roson, eĉ ne la plej malpezan polenon de ili. Li ja kunkolektis larmojn de la pola popolo, disŝutitajn sur la kampoj kaj formis el ili, - kiel el kristalo de rara harmonio - diamanto de beleco en diademo de l' homaro. Ĝi estas la plej granda, kion povas fari majstro. Kaj Fryderyk Chopin tion efektivigis".

Nia spegulo

SEKRETARIO DE "SET-1960" INFORMAS:

Opava 2.6.1960. La unua etapo estas plenokupita, en la dua etapo estas nur kelkaj lokoj liberaj.

Matušková

SOMERA KOLEGIO DE EPERANTO EN ZNOJMO

estas aranĝata de E-Klubo ĉe la Kleriga Kunularo en Znojmo kunlabore kun ĈEK en Praha kaj sub protekto de la konsilantaro de MNV en Znojmo en la tagoj 11-27 de julio 1960. Kursoj: elementa, perfektiga, seminario. Adreso: Esperantista klubo en Znojmo.

HONORIGO ANKAŬ PRO ESPERANTO-LABORO

Gazeto de VŽKG en Ostrava (21.5.1960) informas, ke la Regiona komitato de la Sindikata asocio de metalurgio kaj minejoj honorigis vicon de aktivuloj en kultur-agado, interalie s-anon Drahomír Kočvara, membro de Uzina klubo de ROH kaj gvidanton de ĝia Esperanto-rondeto.

KURSANOJ DANKAS AL SIAJ GVIDANTOJ.

Dank' al gesamideanoj Rothová kaj Neubeller, kiuj komence de septembro 1959 reaktivigis la movadon en Poprad, elkreskis tie grupeto de novaj esperantistoj. "Ni, novaj grupanoj sincere kaj tutkore dankas al ili, ka tiel ĉi ebligis al ni ekkoni ne nur gravan lingvon, sed ankaŭ nunan vivon de tutmondaj esperantistoj, kaj labori kun ili. Ni esperas firme, ke ili ne trompiĝos en sia grandega celo kaj havos el ni utilajn esperantistojn".

Por la klubanoj: D-ro Michal Mlynár.

ESPERANTISTOJ EL TŘINEC RAPORTAS.

Violonĉelisto D-ro Pravoslav Sádlo-Páv koncertis en Třinec. En la kadro de la 15-a datreveno de liberigo de nia lando per Ruĝa Armeo, aranĝis la E-rondeto de ZK TŽ VŘSR en Třinec solenan koncerton de violonĉelisto D-ro P. Sádlo-Páv el Praha. Kvankam en la programo de koncerto estis grava muziko de komponistoj Boccherini, Reger, Schumann, Jirko, kaj Ĉajkovskij, por pluraj ĝi estis nemulte komprenebla. Tamen partoprenis pli ol 200 aŭskultantoj, kiuj per tondra aplaŭdo esprimis sian kontenton. Posttagmeze la saman tagon estis organizita eduka koncerto kun vortakompano por lernantaro de Třinec kaj lernejoj. Partoprenis ĝin ankaŭ pli ol 200 aŭskultantoj, infanoj.

En la kadro de la datrevenaj solenaĵoj la E-rondeto organizis aŭtobusan ekskurson (7.-9.V.) al Znojmo, Vranov-a valbaraĵo, kasteloj k. a. En Znojmo la partoprenantoj renkontiĝis kun lokaj esperantistoj, kiuj kondukis siajn gastojn al riĉaj vidindaĵoj de la urbo kaj al sia belege aranĝita klubejo. Tutkorajn dankojn por varma amika akcepto. La ekskurson partoprenis ankaŭ kelkaj membroj de la 1-a socialisma labor-brigado, kies patrono estas la Esperanto-rondeto.

LABOR-KUNVENO EN TŘINEC (la 18-an kaj 19-an VI.)

Sabate partoprenis 60 gesamideanoj dancvesperon kun kultura programo, kiun preparis junaj membroj de la rondetoj ĉe ZK TŽ VŘSR en Třinec kaj VŽKG en Ostrava.

En dimanĉa kunveno prelegis D-ro Jermář, prezidanto de ĈEK kaj D-ro Jan Štrup el Kleriga Instituto en Praha. Partoprenis ankaŭ du gastoj el Pollando. Post la kunveno okazis ekskursoj sur la montoj Javorový kaj Ĉantoria, kie oni renkontiĝis kun ĉirkaŭ 50 esperantistoj el Pollando.

NOVA LERNOLIBRO DE THEODOR KILIAN

Laŭ "Zprávy ĈEV" n-ro 5 aperos nova lernolibro de Esperanto en la 1-a duonjaro 1961. Por povi respondece fiksi eldonkvanton, la grupoj antaŭmendu la lernolibron ĉe Ĉs. esperantský výbor Praha XII. , Blanická 4

ĈEĤOSLOVAKAJ ESPERANTISTOJ LIBERTEMPOS EN BULGARIO.

Ĉedok organizas dusemajnan ekskurson en Bulgarion speciale por esperantistoj en la tagoj de Bulgara Esperanto-kongreso. Ni nun konstatas, ke pro nesufiĉa inform-servo de ĈEK kaj de la rondetoj la esperantista publiko sciigis pri la ekskurso malfrue aŭ tute ne.

PRAGANOJ POR SPARTAKIADO.

Por la celoj de la II-a Tutŝtata Spartakiado la Esperantista Klubo en Praha aligis pere de Kultura Centra 35 fremdulgvidantojn.

NOVA EJO DE EK PRAHA

30.4.1960 estis malfermita klubejo de Esperantista Klubo en Praha, nome en: Týnská str. n-ro 3 (tuj apud la Malnov-urba placo). Baldaŭ troviĝos ti ankaŭ la kluba biblioteko kaj gazet-legejo.

ĈU VI JAM ANTAŬMENDIS? KION?

Por la Hromada-vortaro venis al ĈEK ĉirkaŭ 5200 mendoj. Ne forgesu antaŭmendi la lernolibron, kiel menciite sur la antaŭa paĝo!

Por "PRAHA, gvidlibro" de J. Havlík venis jam 3000 mendoj de unuopaj KNIHA-vendejoj. Privatajn antaŭmendojn akceptas: KNIHA 2086, n.p., Praha II. Václavské nám. 42. La gvidlibro estos bindita kaj kostos Kčs 16,50.

ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKA GAZETARO.

"TECHNICKÉ NOVINY" n-ro 17 (Bratislava 27.4.1960) - artikolo: Esperanto inter teknikistoj (D-ro I. Havaš interalie mencias pri k-do Armand el Moskvo, kiun Esperanto helpis pli ol interpretisto dum scienca ekspedicio apud la rivero Hoang-ho en Ĉinio.

"PRÁCA" n-ro 105 (Bratislava 1.5.1960) - artikolo: Enketo de UNESCO inter sciencistoj de 21 ŝtatoj. - Lingva problemo en scienco kaj tekniko. Aŭtoro de artikolo admonas, ke hodiaŭ jam ne sufiĉas al sciencistoj nur laboratorio, laborejo kaj faka literaturo. Montriĝas bezono de pli proksima kunlaboro de diverslandaj fakuloj, la bezono korespondi, viziti sin reciproke, studvojaĝi, partopreni kongresojn k.s. La

poŝto kaj trafikiloj faciligas tiujn kontaktojn, sed ties efekton malvalorigas la lingvaj baroj. La artikolo taksas kaj komparas: 1) diversajn lingvojn naciajn, 2) latinan lingvon, 3) Esperanton. Konkludo de la aŭtoro rekomendas Esperanton, ĉar ĝi estas pli facile lernebla, simpla kaj logika en gramatiko, unueca kaj klara en vortoj, sen balasto de idiomoj kaj ĵargonoj, ĝi havas simplan ortografion kaj klaran fonetikon.

Janouš

"FILATELIE" n-ro 9 (Praha 9.5.1960) - mencio pri p.m. de Zamenhof-jubileo en Brazilo - pĝ. 178, bildo sur pĝ. 179.

L A M O V A D O E K S T E R L A N D E

EN POLLANDO estis fondita komitato por enkonduko de Esperanto en lernejojn. En kvar subkomisionojn estis elektitaj eminentaj verkistoj kaj pedagogoj. Prezidanto de la komitato fariĝis longjara fervora esperantistino Prof. D-ro Halina Szablowska.

EN VARSOVIA OPEREJO post finiĝo de la E-kurso estis fondita Esperantista Klubo, kies celo estas vastigi Esperanton inter oper-artistoj. Samtempe oni preparas operon en Esperanto.

EN LA UNUA POLA SOCIALISMA URBO NOWA HUTA fondiĝis 21.4.1960 Esperantista Klubo kun 38 membroj - laboristoj, metalurgistoj, fandej-inĝenieroj k.a. Ili deziras interkontakti kun ĉeĥaj esp. precipe el VŽKG, NHKG, TŽ VŘSR - fabrikoj kaj kun loĝantoj el socialisma urbo Havířov. Adreso: Mieczysław Dydak, NOWA HUTA; Kraków Osiedle C-33, blok 21 m. 21. Pollando.

TRANSOCEANA ŜIPO "ZAMENHOF" albordiĝis en patra haveno Gdynia. Post surakvigo en jugoslava Split kaj vojaĝo al Popola Ĉinio ĝi unuafoje venis hejmen. Polaj esperantistoj bonvenigis ĝin per vizito inter la ŝipanaro.

POLAJ ESPERANTISTOJ EN WROCLAW organizas vojaĝon per kajakoj, kiun povas partopreni ĉiu ano de E-Asocio, kiu samtempe membras en Pola turisma asocio. Dum la vojaĝo tra polaj riveroj kaj lagoj estos praktikata Esperanto, en vesperaj bivakfajraj programoj oni ankaŭ informos pri la Internacia Lingvo la apudakvan feriantan publikon.

SZILÁGYI-VESPERO EN BUDAPEST. La "Konkordo" E-Rondo en Budapest aranĝis la 6.6.1960 literaturan vesperon pri la vivo kaj verkado de D-ro Ferenc SZILÁGYI, kiu nunjare fariĝis 65-jara. Pri lia laboro parolis D-ro Kalocsay, Balkányi, Prof. Kökény, Halka kaj Baghy, liaj iamaj kunlaborantoj en la hungara movado, ĉe Literatura Mondo kaj la Enciklopedio. Szilágyi forlasis Hungarion pro tiamaj ekonomiaj cirkonstancoj antaŭ 28 jaroj kaj vivas nun en Svedio.

OFICIALA FERVOJA HORARO enhavas eksplikajn tekstojn en Esperanto: en Pollando, Jugoslavio kaj Germanio okc.

DUA ESPERANTISTA LABORBRIGADO en Jugoslavio. Inter 453 laborbrigadoj kun 54.240 gejunuloj-konstruantoj de nova moderna aŭtoŝoseo "Fratego - Unueco" en Serbio kaj Makedonio estas la Dua Esperantista laborbrigado de Jugoslavia Esperantista Junularo kun 120 membroj.

ESPERANTISTA JUNULARA KANTHORO en Ljubljana estas unu el la plej bonaj en Slovenio. En la distrikto Ljubljana estas elektita kiel la plej bona el sep samkategoriaj.

LA 3-a UNIVERSALA KONFERENCO de Popolaj Universitatoj, okazonta septembre en Strasburg, uzos denove Esperanton kiel lingvon oficialan.

LA NEDERLANDA ŜTATSEKRETARIO G. C. Stubenrouch transprenis peticion por enkonduko de Esperanto en nederlandajn popolajn lernejojn, subskribitan de, aŭ nome de 312.000 nederlandanoj.

PUBLIKA ŜTATA BIBLIOTEKO en Delhi, fondita de UNESCO nur sub gvido de la hinda registaro, fondis Esperantan fakon. Per libroj kontribuis esperantistoj el 40 landoj.

BRASILIA, nova ĉefurbo de Brazilo ekfunkciis 21.4.1960 240 km distance de Brasilia konstruiĝas esperantista kolonio, estonta urbo "Bona Espero".

LA VIRINO DE AMERIKO - 1960, fariĝis s-ino Angelina Acuña, estraranino de Gvatemala Esperanto-Asocio. La diplomon kaj oran medalon ŝi ricevis 1.5.1960 en Novjorko en hotelo "Baltimore".

EN POLLANDO fondiĝis esp. klubo por inĝeniera geologio, hidrogeologio, krudaĝa geologio k.a. Adreso: Pola-Esperanta Geologo-Klubo, Varsovio 10. str. Jasna 6. Pollando.

MEDICINO KAJ ESPERANTO. Ambaŭ estas helpiloj por la homaro kaj ilin kunigi estas la bela idealo de kuracistoj-esperantistoj. Medicinistoj, kontaktiĝu kun la sekretario de Tutmonda Kuracista Esperantista Asocio: D-ro Maria Jarnuszkiewicz, Kraków, str. Mazowiecka 69, Pollando.

LA FIRMAO PHILIPS, sekcio por medicinaj aparatoj ppreparas informajn presaĵojn en Esperanto por dissendo al esperantistoj-medicinistoj. Ĝi do deziras ricevi adresojn de kuracistoj, profesoroj kaj studentoj de medicino, flegistinoj, farmaciistoj. Anoncu vin al: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, DEN HAAG, Nederlando.

NI DISKUTAS PRI INFORMADO

Hodiaŭ ni publikigas proponojn de nia leganto en Germana Demokrata Respubliko, s-o E. Koblichke el Xittenbenberg:

ĈU NI VERE ĈIEL PROSPERIGAS ESPERANTON?

Pripensu ĝin! Ĉiu el ni havas iom diferencon vivon aŭ profesion kaj privatan. Same varias kaj abundas manieroj de agado por la Internacia Lingvo. Tamen ni ĉiuj povas li intense kaj celtrafe ataki nian plej intiman rondon familian kaj amikan (eluzu ĉiun okazon por paroli konversacie kun la konatoj pri la afero, nature, hazarde) kaj poste laŭeble atentigi nian sindikaton kaj fak-organizon pri Esperanto, postuli racian pritakson kaj agnoskon. Ĉiu el ni agu laŭ niaj fortoj kaj saĝo, ne atendu, ke nur niaj oficialaj E-institucioj prizorgos ĉion en landskala ampleksa formato!

SUGESTU STARIGON DE ESPERANTO-HOTELOJ!

Faru konventempe oportunan kontrakton kun bona hotelo en via loko. Instigu, ke unu aŭ kelkaj personoj de tiu hotelo ellernu kaj uzu la Internacian Lingvon, poste publikigu tiun ĉi fakton en la gazetaro. Vojaĝantoj-esperantistoj preferos tian avantaĝan hotelon kaj esperatistaro de la koncerna urbo profitos intermaciajn renkontiĝojn.

NI INICIATU, KE ĴURNALISTOJ KAJ VERKISTOJ MENCIU ESPERANTON EN SIAJ NACILINGVAJ VERKOJ.

Kvazaŭ hazarde ni iam renkontas, neintencitan mencion, la vorteton ESPERATO, ĉu en ideala aŭ tute praktika senco. Tamen ni sincere konfesu ĝian efekton. Mi mem spertis tion antaŭ nelonge, ĝuante spritan verkon de Egon E. Kisch "Paradizo Ameriko". Mi legis, ke en tiea elstara restoracio plej ŝatata de tutmondaj maristoj, estas prop. periodaĵoj presitaj plejparte en la angla kaj Esperanto. Ni agu, kaj se necese, ni disponigu materialon.

LA TUTMONDA E-ISTARO PLI VASTE UTILIGU LA INFLUA AŬTORITATECON DE ESPERANTEMAJ MINISTROJ, URBESTROJ k.a. (PROFITE AL LA E-a MOVADO!)

Ni, ĉiuj, la amaso de esperantistaro, speciale la instruistoj, zorgu konstante pri novaj kadroj. Donu tiel al inklinaj aŭ aktivaj esp. ŝtatfunkciuloj la necesan moralan subtenon, por ke ili povu efike progresigi la movadon.

5. NI SENDU RECIPROKE AL NIAJ ALILANDAĴ KORESPONDANTOJ ESPERANTLINGVAJN LIBROJN KAJ GAZETOJN.

Laŭpove ni interŝanĝu la novaperintajn e-aĵojn de nia lando. En ŝtatoj, kie post 1945 eldoniĝis nur malmultaj aŭ tute neniam Esperantaj verkoj (GDR), tieaj ges-anoj ekspedu laŭdezire tie presitajn verkojn beletrajn, fakajn, fremdlingvajn aŭ fabrikaĵojn por la lando tipajn.

KONKURSO DE FAJRERO

La unua konkurs-serio estas fermita. Partoprenis en ĝi sume 23 gesamideanoj

el 16 lokoj, 2 el eksterlando (USSR kaj Bulgario). En la II-a kategorio (internacia) venkis s-anino Gabriela Rothová el Poprad, ĈSR kies artikolon pri Chopin ni publikigas. Ŝi ricevas la unuan premiaĵon, kiun dediĉas nia amiko s-ano inĝ. Gustav Nilsson el Stockhomo, Svedlo - libron "Gösta Berling" de Selma Lagerlöf.

En la I-a kategorio ricevas unuan premiaĵon S-anino Vlasta Knížková el Teplice lázně v Čechách - Ziołkowska: "Doktoro Esperanto".

En la intergrupa konkurso venkis Poprad antaŭ Červená kaj Bílá Voda.

Sinceran gratulon al la venkintoj !

La konkursaj taskoj havis ĝenerale altan nivelon. Mi esperas, ke la intereso pri la konkurso en la ceteraj serioj ne malgrandiĝos. Pro manko da loko ni publikigos nomojn kaj poentojn en la 4-a numero kaj la finan rezulton en la 5-a numero de Fajrero.

La ĝustaj tekstoj:

II/2 (1-a n-ro): Korektu la erarojn! per tio, ke vi trovos la erarojn kaj mem ilin korektos, vi montros, ke vi scias . . . Multo dependas de tio, ĉu . . . estas plena de eraroj. . . verku NUR kiam vi estros. . . vi havas mankon DE tempo. Sed FINU. . . tio validas por ĈIU. Restas ni tamen eta ono DE ĉiu tago. . . oni ĈESIGAS sian. . . havas la taskon duone FARITA. Neniam pensu, ke vi ne bezonas studi PLU. . . . MALVARMUMON. Rilate TIUN AFERON... li estis ĜUSTE rigardata. . . Mi igis al mi la mantelon. . . Ne perdu EĈ horon. . . principon DE sufiĉo. . . mi restis SOLA En la ĉambrego... Kafka kaj LIA edzino. . . Tiu urbo estis konstruITA. . . ĝi ANSTATUAŬAS aŭ rilatas. . . en frazoj aŭ PPOPOZICIOJ ... en la Plena Gramatiko de Kalocsay-Waringhien. Unu ĉevalo helpas pli ol unu HOMON en tiu vilaĝo. . . Oni devis disdoni ĉirkaŭ SAMAN KVANTON. . . Mi timas, KE vi. . . Li deziras, KE vi. . . NOVAJN kraĵonon kaj plumon. Li altelefonis min ANTAŬ ol iri dormi. ĴUS antaŭ momento . . .

I/2a: Pracovní skupina ještě nebyla v činnosti. Stál jsem před tovární kanceláří a marně jsem se snažil zapálit cigaretu. Vítr, který ohýbal topoly, několikrát shasil můj benzinový zapalovač. Jeden dělník mě s úsměvem pozoroval, přistoupil ke mně a nabídl mi krabičku zápalek "Burja". Bylo možno na ní číst nápis "větrovzdorné". Výjmul z krabičky zápalku, škrtl jí, a v klidu jsem si cigaretu zapálil, jako by vítr přestal vanout.

I/2b: Ni rememoras la dek-kvinan datrevenon de liberigo de nia patrujo pere de soveta armeo per valoraj labor-devoligoj. - Se mi ne estus fuminta, mi ne estus malsana. - Per kio mi kontribuu por nia venko?- Se nia avo estus vidinta flugantajn raketojn, sendube li estus mirigita. - La dek-duan de majo mil naŭcent sesdek. La 12 Majo 1960. . . . de la jaro mil naŭcent sesdeka.

LA TRIA SERIO:

I-a kategorio:

3a/ Přeložte do esperanta: Bylo mně řečeno, že máte k pronajmutí pokoj, opatřený nábytkem. Kde se mohou koupit zralá jablka, ořechy a brusinky? Já nerad polévku. Dejte mně raději pstruha s majonézou. Podle mého názoru, spolupráce mladých esperatistů se staršími je nutná. Kde prodávají upomínky? Rád bych

přivezl své rodině něco z Československa.

3b/ Přeložte z esperanta do češtiny: Mi kredas, ke Esperanto estas la plej vivanta ekzemplo de la internacia frateco de la laboristoj. La piroj kaj prunoj estas el Ĉeĥoslovakio, la oranĝoj el Hispanio kaj la vinberoj el Bulgario. Tiuj ĉi floroj devas esti transplantataj aŭ aŭtune aŭ printempe. Kial vi ne anoncas vin por vizito de la famekonata fabriko?

3c/ Kiu filmo plaĉis al vi en la lasta tempo plej multe kaj pro kiu motivo?

II-a kategorio - internacia:

3a/ Komparu la Esperantan gramatikon kun tiuj de aliaj naciaj lingvoj. Kiuj avantaĝoj de ĝi estis por vi plej okulfrapaj, kiam vi komencis ĝin studi?

3b/ Priskribu al ni etan epizodon el via vivo, kiu montris al vi, kiu estas via vera amiko kaj kiu nur false supozigis tion!

3c/ Kiuj faktoroj povus favore influi evoluon de la Esperanta movado en via koncerna lando?

La solvitajn taskojn sendu antaŭ aŭgusto-fino al: Vlastimil Novobilský, prom.chem., Slavíkova 356, ÚSTÍ nad Labem, ČSR.

B - K U R S O = AL KURSANOJ.

Revenadu ofte al pasintaj ekzercoj. Senĉesa ripetado memortenigos kaj "aŭtomatigos" la lernitan. Dediĉu al Esperanto ĉiutage almenaŭ kvaronhoron, ĉar nur regula lernado donos al vi sukceson. Memoru, ke Esperanton vi povas plene eluzi nur, se vi plene ellernos ĝin.

Josef Cink

EKZ. 29-a: Napiŝte si a nauĉte se:

sur s l. pádem – na (na otázku kde?)

sur se 4. pádem - na (na otázku kam?)

sub s l. pádem pod (na otázku kde?)

sub se 4. pádem - pod (na otázku kam?)

EKZ. 30-a: Přeložte: La plumo kuŝas sur la tablo, ĉu vi metis ĝin sur la tablon? Ni iru sub tegmenton. Ĉi tie ni estas sub tegmento. Venu sub nian fenestron kaj ekfajfu! Sub ŝiaj fenestroj kreskas rozoj.

EKZ. 31-a: Přeložte: Povĕs kabát na věšák! Pod stolem je papír, seber (zvedni) ho! Pod tím stromem nebude pršet. Položil jsem ji na židli. Našel jsem ji na stole. Mám to napsané na papíře. Kufř jsem dal pod postel.

EKZ. 32-a: Rozhodněte, zda české "tam" v následujících větách odpovídá otázce kde? nebo kam?:

Tam je to. Tam nechod! Tam nejdu. Proč jsi tam nebyl? Tam nikdo není. Šel jsem tam. Já tam pujdu také. Bude tam také ona? Podívej se tam! Tam někdo jde. Tam vlevo to je. Tam jsem už byl. Je tam mnoho lidí? Tam je dnes vedro. Víc vody tam už není? Dej to tam na stůl.

EKZ. 33-a: Přeložte věty z cv. 32, víte-li, že "tam na otázku kde? se přeloží "tie" a na otázku "kam" se přeloží "tien":

EKZ. 34-a: Napište překlad vět ze cv. 31 a 32!

EKZ. 35-a: Naučte se všechna neznámá slovíčka z následujících: urbo, ĉefurbo, vilaĝo, loĝanto, strato, trotuaro kvartalo, konstruado, domo, angulo, parko teatro, kino, turo, relo, elmontra fenestro, preĝejo, stacidomo, hotelo, malsanulejo, tramo, stacio, vendejo, gastejo, restoracio, nutraĵvendejo, sukeraĵejo, librovendejo, policano.

EKZ. 36-a: Odpovězte a každou otázku rozveďte na další: Ĉu vi loĝas en urbo? Vilaĝo? Kiom da loĝantoj ĝi havas? Kia estas nia ĉefurbo? Ĉu la stratoj en urbo estas rektaj? Kiel nomiĝas la ĉefa strato? Ĉu la trotuaroj estas la larĝaj? Puraj? Ebenaj? Kiu estas la plej bela konstruaĵo? Ĉu la domoj estas grandaj? Novaj? Ĉu via domo estas granda? Kie estas parko? Kio estas en ĝi? Kie estas teatro? Ĉu Vi ofte vizitadas kinon? Kiom da preĝejoj estas tie ĉi? Ĉu estas ĉi tie stacidomo? Por kio servas hoteloj? Ĉu tramoj veturas tie ĉi? Kie ili veturas? Kiom enhavas elmontraj fenestroj? Kie vi aĉetos panon? Librojn? Kien vi iras? - se vi soifas? Kion oni vendas tie?

EKZ. 37-a: Přeložte nahlas následující povídku z Kabe-lernolibro: Soldato estis pafita en piedon. Oni transportis lin en malsanulejon. Tie oni operaciis lin. Ili trancia truon en lian piedon. Ili servis la kuglon. Kiam la soldato ne povis toleri la doloron, li demandis: "Kial vi tranĉas en mia piedo?" - "Ni serĉas la kuglon." Li ekkriis: "Kial vi ne diris tlon pli frue, mi havas ĝin en la poŝo."

EKZ. 38-a: Po vyhledání neznámých slovíček se naučte povídku ze cv. 37 plyně číst a překládat.

EKZ. 39-a: Vyhledejte z povídky ve cv. 37 všechny předložkové vazby s předložkou "en" a odůvodněte proč je po "en" někdy l. pád a jindy 4. pád a kde.

EKZ. 40-a: Vypravujte povídku ze cv. 37.

EKZ. 41-a: Přeložte následující příslovce: tre, tro, ankaŭ, ankoraŭ, preskaŭ, sencese, bezone, eble, sufiĉe, certe.

EKZ. 42-a: Napište na každé z příslovcí v cv. 40 dvě věty.

EKZ. 43-a: Přeložte písemně (dom. cv.) následující věty podle vzoru: "Rád zpívám - mi ŝatas kanti": Ona velmi ráda tančí. Nerad jím polévku. Mám rád koláče. Máš rád ryby? Velmi rád čte. Nemají to rádi. Chodíš rád na fotbal? Nerad se myješ, vid'?

EKZ. 44-a: Napište v esperantu anekdotu. Bude-li krátká, napište dvě. (Dom. ev.)

Daŭrigota

Unu komparo de Esperanto kaj la angla lingvo

| Resto de nekonataj vortoj en ordinara teksto: | Lernitaj vortoj | |
|--|-----------------|----------|
| | en la angla | en Esp-o |
| 16 % | 1400 | 550 |
| 10 % | 2350 | 790 |
| 7 % | 3000 | 965 |
| 3,2 % | 4700 | 1400 |
| 1,2 % | 7000 | 2000 |
| 0,25 % | 10000 | 2800 |
| 0,15 % | ? | 3000 |

"ESPERANTO" - revuo internacia de UEA, n-ro 10/59 alportas interesan artikolon de Vilho Setälä pri lingva efekto. La pli supra tabelo montras la kvoton de kompreno ĉe sama vortprovizo en Esperanto kaj en la angla. Dank' al la genio de Zamenhof, al strukturo kaj vortfarado, la rezultato estas tiom favora.

Konstruistoj de pontoj kaj ŝoseoj en la 2-a parto de la Jarlibro 1959 de UEA estas "Teknika terminaro pri ŝoseoj kaj pontoj" de A. Broise!

Kaj jen kelkaj terminoj tatigaj ankaŭ por ĉiutaga uzo:

| | |
|-----------------------------------|--|
| almo – strojina stojna | piliero - mostní pilíř |
| angul-relo - úhelník | spano - rozpětí |
| dilo - fořna | (aŭto)ŝoseego - dálnice |
| devolo - klenební kámen | ĉarŝoseo - vozovka |
| drenilo - drenážní trubka | (ŝose)bordo - krajnice |
| irejo - zatačka | estra vojo - hlavní silnice |
| junto - spára | cizalo - křiřovatka |
| membraĵo – pasnice | celstango - výtyčka |
| pikildrato - ostnatý drát | traknivela pasejo - řelezniční přejezd |

LEKANTETO – por infana paĝo de FajreroKian forton havas bestoj.

Vi certe ne kredos karaj infanoj, kian forton havas konata hejma muŝo. Per siaj piedoj ĝi povas treni gumeton. Ĉu ŝajnas al vi tio ĉi malmulte? Kleraj homoj kalkulis, ke unu viro devus porti sur siaj ŝultroj ok metrojn longan trabon, se li volus esti relative same forta. Tio sufiĉas, ĉu ne?

Kaj la ~~putelo~~ puleto, ankaŭ konata besteto, tiu saltas 200-oble pli alten ol mezuras ĝia propra korpeto. Se vi volas tian salton imiti, vi devus salti trans la faman Ejfelan turon en Parizo. Eble vi scias, ke estas 300 metrojn alta. Tio estus sufiĉe alta

salto, ĉu ne?

La abelo, kiu estas kapabla porti 50-oble pli pezan ŝarĝon ol ĉevalo, kompreneble, kiam ni komparas ŝarĝon laŭ pezo de iliaj korpoj.

La ostro (ústřice), mara akefalo (mlž) kun du platoj estas kapabla fermi sian konkon (lastura) per tia granda forto, kiu egalas al 15 kilogramoj. Se tion volus imiti homo, li devus proporcie al sia grandeco porti sur sia kapo, miru, 80 rapidvagonarajn lokomotivojn.

(Laŭ N.P. el la jaro 1942)

Kaj ankoraŭ ni rakontos al vi unu fablon de Lessing laŭ traduko de L. E. Meier: Leono kaj leporo.

Leono indigis petolan leporon per sia amikeco. Foje lin demandis la leporo: "Sed ĉu estas vere, ke mizera krianta koko povas vin facile forpeli?" - "Estas vero", respondis la leono, "kaj estas ĝenerale konate, ke, ni, grandaj bestoj, havas ĉiuj certan etan malfortecon en nia karaktero. Vi eble eksciis jam, ke gruntado de porko kaŭzas al elefanto frostotremojn kaj teruron!" - "Ĉu vere?" interrompis lin la leporo. "Ho, nun mi jam komprenas ankaŭ tion, kial ni, leporoj, tiel terure timas hundojn."

- - -

Niaj junaj legantoj, por la someraj ferioj akceptu nian sinceran bondeziron feliĉan kaj sunplenan ripozon! Ne forgesu skribi al ni pri viaj travivaĵoj.

Lekanteto

RECENZOJ

KIE ABUNDO ESTAS MALOFTA KAJ MANKO PLI MALOFTA

Sub tiu titolo la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj en Danlando eldonis 32-paĝan, riĉe ilustritan libreto pri Danlando, ĝia ĉefurbo kaj pri la dana popolo. La libreto estas senpage ricevebla ĉe danaj ambasadejoj.

JUGŬ MEM! - faktoj pri ĈSR, informa broŝuro 86-paĝa. Ĝi estas destinita por eksterlandaj esperantistoj, kiuj postulu ĝin rekte de: Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, Praha 4, Blanická 12, ĈSR.

LUDVIC LAZARUS ZAMENHOF - Inventor of Esperanto. De aŭtoroj John Hornby, Colin Andrew (desegnaĵoj). Eldonis "Daily Sketch Modern Boys Annual", NORTHCLIFFHOUSE, London, E. C. 4, Anglio. - Sintezo biografio de Zamenhof por anglalingva junularo en formo de komix. Certe bona ideo, doni al junularo informon pri Esperanto en formo, kiu kaptas ĝian intereson. Tamen ni devas konfesi, ke ĉe ni tiu formo eluziĝis, ĉar oni prave kritikis, ke arta valoro de tiuspecaj bildserioj estas dubinda.

J. W.

MEMUARO PRI GEOGRAFIAJ NOMOJ de AVOTO, prezentita al la 44-a

U.K. en Varsovio. Havebla de la aŭtoro: BM/Avoto London, W. C. 1., Anglio. Prezo: 2 resp. kup. plus afranko. La aŭtoro proponas direkton por solvi la aferon de propraj nomoj en Esperanto, precipe por akiri unuecon. Kelkaj liaj konkludoj estas kontraŭ principoj de evoluo. Nura logiko kaj aŭtoritata decido, kiun li proponas, ne helpas (-ujo, -io). Kial kompliki la aferon ĉe tiaj kazoj: Reichenburg kaj Liberec k.s. Al la donita ekzemplo: ne estas ja necese mediti. Liberec estas ĉeĥa urbo: esperentistoj do uzu LIBEREC, ne la germanan nomon Reichenburg. J. W.

RAVENNA. Dua eldono de 32-paĝa, bela, ilustrita libro en Esperanto. Senpage ricevebla de: Esperanto-Grupo, Piazza Anita 1, Ravenna, aŭ: Azienda Autonoma Soggorno e Turismo, Via 13 Giugno, Ravenna, Italio.

JUNULARA KANTARETO, kompilita de Josef Cink, 48-paĝa, kun kovrilo, kun tekstoj kaj muzik-notoj (54 kantoj aperos en julio kiel eldonaĵo de "Fajrero". Prezo ĉirkaŭ 5. Kĉs. Antaŭmendu en nia administrejo!

VORTOJ EL REDAKCIO KAJ ELDONEJO

Ni petas vian pardonon pro la 2-a n-ro, en kiu svarmis mistajpoj kaj la ĝenerala aspekto kaj legebleco malboniĝis. Ekde la 2-a n-ro ni estas devigataj uzi novan presmanieron, kiu malebligas kian ajn lingvan korekton post pretigo de matricoj fare de neesperantista tajpistino ĉe presmaŝino. Same ĝi validas pri tiu ĉi n-ro.

En KRUCENIGMO (2-a n-ro) ne estis signitaj nigraj kampetoj, pro kio ĝi estis nesolvebla. Pardonu kaj signu nigre: D4-11, E3-4-11-12, F4-11, G6-9, H6-9, 17-8.

NI DANKAS AL NIAJ SUBTENANTOJ, por kies helpo estas jam garantiitaj 6 ĉi-jaraj numeroj. Pro manko de spaco ni ne povas mencii la nomojn de donacintoj. Stato la 1.5.1960 - 727 Kĉs krom la kutima pago. Koran dankon!

LA RESPONDA REDAKTORO Inĝ. J. Werner transiris al Košice, novan adreson li anoncos en venonta numero.

ADMINISTREJO ESTOS NEOKUPITA dum ferioj, ĉiuj korespondaĵoj estas respondotaj komence de septembro.

DANKON POR ĈIUJ SALUTOJ KAJ BONDEZIROJ, kiuj al ni venis okaze de la 1-a majo kaj la 15-a datreveno de liberigo de Ĉeĥoslovakio.

FAJRERO LIKVIDOTA? Pro la antaŭvidata foriro de kelkaj kunlaborantoj el la redakta kaj eldona rondo estas eble, ke en 1961 Fajrero ne povos plu aperadi. Kiu rondeto povus nin anstataŭigi? Kiu povos preni ĉefredaktadon? Proponu solvon, skribu al la adreso de Vl. Kočvara (adm.).

A N O N C E T O, J

JAPANOJ DEZIRAS KORESPONDI KUN VI! Skribu al:

La Societo de Internaciaj Korespondamikoj, 1432, Kamišidami Morijasaŝi, Aiĉiken, Japanio. (La adm. de Fajrero povas al vi pruntedoni adresaron de la societo, ankaŭ kun fotoj.)

LETERVESPERO. La 22-an de aŭgusto estos LETERVESPERO en la "Konkordo" E-Rondo, Budapest II., Mechwarttér I. Népműv. o. Hungarlando.

Anoj de INFANA TEATRO (infanoj) dez. kor.: Dyr. Andrzej Foks, Teatr Dzieci Pruzskowa, PRUSZKÓW, k(W-wy), ul. Koscinski 39, Pollando.

KOLEKTIVE KORESPONDI kun E-rondetoj, ankaŭ en ĈSR pri E-movado kaj div. aferoj, dez.: Esperanto-rondeto ZK ROH Strojírny TATRA, KOLÍN, ĈSR.

LEO G. FIŠBEJN, mineja inĝ., gorod UZLOVAJA, Tulsko, obl.ul.I. Danĉaja 42-10, USSR - serĉas seriozan ĉeĥan kunlaboranton, kiu por li tradukus interesaĵojn el nuntempa vivo de ĉs. ministoj, precipe el "Ĉs. horník". Bv. helpi la kluboj!

KUN ĈS. JUNULOJ: Kozlov Vladimír, JALTA (Krim), Kievskaja 3, USSR

DEZ. KORESP.: TRUONGGNANG DE gr trung cap 3, Lamson, THAEHOA, Vietnamio.

PRI STENOGRAFIO kor. kĉl. kaj al ĉs. sam. liveras lernolibron "Tajpado", E-stenografion Duployé-Flageul kaj revuon Fluganta Skribilo: A. Staňura, Ĉkalovova 86 Ostrava – Poruba. ĈSR.

Kun ges-anoj en ĈSR dez. intŝ. bildkartojn: V. Kibalĉiĉ, Tichý Potok, p. Brezovica n/Tvr. , ĈSR.

OKSNER Zdeněk, Gottwaldov-Zlin, Zárámí 1554/48, ĈSR, dez. interŝanĝi alometitiketojn tutmonde.

HUNGARAJ PIONIROJ dez. kor. kun ĉiuj ĉs. lernejoj kaj in+ŝ. E-materialon por lerneja Esp.-ekspozicio: Politika Esperanta Studrondo por Pioniroj "EZERMESTER" Fövsrosi Fiuiskola. Baranyai utc, 18. XI-ker. Budapes Hungario.

KORESPONDI DEZIRAS GES-ANOJ EL ROSTOV-DON: Valja Koňdraŝeva, Str. Donskaja 52, Rostov. Don, USSR:

Aderkass Maks, Puŝkinskaja 156 kv. 5 Rostov-Don, USSR

Michal Nevskij, Str. Karl Marks 121 Rostov-Don, USSR

Svetlana Ĉudakova, Suvorova 11 kv. 5. Rostov-Don, USSR

Elena Karpova, Suvorova 11 kv. 1, Rostov-DON, USSR.

Anna Šupová, Mutěnice ĉ. 25 apud Hodonín ĈSR. - pri variaj temoj kaj intŝ. p. m. kaj p. k.

Jiřina Hilburgérová, Bukovany apud Kyjov, ĈSR
gejunuloj el la tutmondo kaj ints. p.m. kaj p.k.

Mil. Drozdová, Dražůvky apud Kyjov, ĈSR. -kor. per bk.

